# ILEI aktiva en Azia Konferenco

Inter la 6a kaj 12a de novembro 1989 okazis Azia Konferenco pri la Instruado de Esperanto en la Universitato de la nacioj, en Nanning, suda Ĉinio. Partoprenantoj venis el pluraj regionoj de la lando (iuj vojaĝintaj ĝis 6 tagoj por alveni) kaj agrable multnombre el eksterlando — Belgio, Estonio, Japanio, Koreio, Usono kaj Svedio.

ILEI estis bone reprezentita: partoprenis aktive ĝia prezidanto, s-ro Edward Symoens el Belgio kaj la UEA-estrarano kaj ILEI-sekciestro, d-ro So Gil-su el Seulo, kies tasko estas resti en proksima kontakto kun la ĉina kaj aliaj movadoj de Azio. S-ro Symoens alparolis la konferencon, skizis la laboron de ILEI kaj diskutis detale kunlaboron. Estas decidite ne fondi en Ĉinio unu ĉefan edukan centron, kiel oni siatempe planis, sed, pro la grandegaj distancoj, starigi pli modestajn sed bone ekipitajn regionajn centrojn en tiuj lokoj, kie jam ekzistas la necesaj homaj fortoj. La faka programo en Nanning kontribuis al la perfektigo de estontaj instruistoj; aldone al prelegoj, vidbendoj de model-lecionoj estis montritaj. Gvidantoj ricevis la kursmaterialon de mag. I. Szanser el Varsovio, uzata en Eŭropo por trejnado de instruistoj, por konstati kiomgrade ĝi estas uzebla en ĉinaj cirkonstancoj.

S-ro Symoens povis krome proponi la novajn lingvo-ekzamenojn de UEA/ILEI, kiuj per tio atingis jam tri kontinentojn en la unua jaro de relanĉo. Dek ses kandidatoj anon-

ciĝis, ok por la meza kaj 8 por la elementa niveloj. Sed pli grave, s-ro Symoens povis detale enkonduki la materialon al la nove nomitaj ĉinaj ekzamenantoj, por ke ili povu krei pliajn testojn kaj okazigi estontajn sesiojn, kunlabore kun d-ro So. La ekzamenantoj, s-roj Li Weilun, Liang Ziming kaj Zhang Danchen (estrarano de ILEI) trovis la testojn kaj ekzamenan formon ĝenerale taŭgaj por iliaj kondiĉoj, sed proponos kelkajn reviziojn en estonta test-materialo.

Konstato el la konferenco estas, ke la pli frue anoncita ondo de interesiĝo kaj entuziasmo por Esperanto komencas malflusi. Unue ĉar la E-movado kaj precipe ĝia instrua agado malfacile povis kontentigi interesiĝon tiom kvantan, kaj due ĉar la lernantoj konsciiĝis iom post iom, ke la eblecoj utiligi la lingvon estas limigita. Sekve ĈEL decidis ŝanĝi sian strategion kaj celi pli kvaliton ol kvanton. Ĉi tiu konferenco spegulis tiun ŝanĝon, kaj donis senprecedentajn eblecojn por komuna trakto de urĝaj pedagogiaj taskoj en internacia rondo.

SMG laŭ raporto de ES, aperonta en Internacia Pedagogia Revuo, n-ro 89/4.